


LA VERDA LUPEO – FENIKSO



N-ro 77 — 1989/1 Aprilo — 21-a jaro

Informilo de Esperanto-Ligo Filatelista
- Faka asocio de UEA -

Oni sendu
aliĝon kaj kotizajon
AL
S-ro Gaston Moch
26, rue de Chartres
Neuilly-sur-Seine



„Espero Pacifista"
Revue mensuelle publiée par
„Pacifisto"
INTERNACIA SOCIETO ESPERANTISTA POR LA PACO




S-ro generalo Sébert
14, rue Brémontier
PARIS



Informilo de ELF-AREK (Faka asocio en UEA)
Esperanto-Ligo Filatelista
Amika Rondo de Esperantaj Kolektantoj

Prezidanto/Kasisto:	I.Paulsson, Skytteholmsvägen 29, S-171 44 Solna.
Stampobanko:	W.Heimlich, Fröbelstr. 4, D-3040 Soltau.
Kotizo 1989:	60 sv.kronoj aŭ 10 us.dolaroj aŭ 20 IRK. Ne plu eblas akcepti poŝtmarkojn!
Poŝtkonto:	51 57 85-4, I.Paulsson, Solna.
Informojn por LVL direktu al:	R.Burmeister, W.-Firl-Str. 30, Karl-Marx-Stadt, DDR-9047

La stampobanko
pretigis novan ofertoliston pri E-filatelaĵoj. Petu ĝin de W. Heimlich kaj aldonu unu IRK por la afranko.





Stampoj

ĈIN 12 A 100 jaroj E

Tiu stampo similas al 12: super paro da eltenditaj manoj troviĝas nia jubilea simbolo. Nur ĉin-ideograma teksto en ĝi. Desegnis: Zhang Linrui. Dato: 1987.7.26. Uzita en Changshu.

ĈIN 15 A 100 jaroj E

La stampo montras la desegnaĵon de nia ĉina E-pm. Mi nur kopie ĝin konas. Dato: 1987.7.26. Loko: Dalian, provinco Liaoning. Informis: Sheng Shuchu al Kajĝi.

ĈIN 16 A 100 jaroj E

El la urbo Fujin. La stampo montras supre ideogramojn, sub ili Esperanta stelo. Meze de la vorto ESPERANTO (kun inversa N). Sube la dato: 1987.7.26. Informis Shuchu al Kajĝi.

ĈIN 18-7 ĝis 18-10 100 jaroj E

Ili ĉiuj estas el la provinco Guangdong. Bv. konsulti la suplementon. Informis Shuchu al Kajĝi.

ĈIN 24 A 100 jaroj E

El la urbo Jamusi, provinco Helongjiang. Ronda kun la enskribo: ESPERATO (inversa S, sen N). Dato: 1987.7.26. Informis: Shuchu al Kajĝi.

ĈIN 33-4 ĝis 33-20 100 jaroj E

Samaspektaj kun la unuaj 3 de ĈIN 33. Ili ĉiuj estas uzitaj en urboj de la Guasngxi-a Zhuang-a Aŭtonoma Regiono. Informis: Shuchu al Kajĝi.

ĈIN 37 A 100 jaroj E

Ronda stampo el Shaoxing kun suba duona terglobo. Tute en la ĉina. Supre la dato 1987.7.26 kun du ideogramoj sub ĝi. Informis: Shuchu al Kajĝi.

ĈIN 42 A 100 jaroj E

Rektangula stampo kun meze ovala terglobo. Tra ĝi la vorto

ESPERANTO. Sube la dato 1987.7.26. Urbo: Wenzhou (Venĝou). Informis: Kajĝi.

ĈIN 43 A 100 jaroj E

En la urbo Wuhai, Neimenggu-a Aŭtonoma Regiono. Supre la vorto ESPERANTO kaj sub ĝi pozas kvinpinta stelo. Meze du manoj. Dekstre: I 139 (numero de la E-pm) kaj maldekstre la dato 87.7.26. Informis: Shuchu al Kajĝi.

ĈIN 49 A 100 jaroj E

Trovita de s-ro Fan Sisheng, raportita en la ĉina filatela gazeto Jiou Bolan 1988/4. Nia Cui Haijing en Urumĉji ĝin tie vidis, kaj certe multaj aliaj niaj klubaj geamikoj. La stampo posedas meze ovalan terglobon kun kvinpinta stelo. Super tio la dato 1887 kaj sub la terglobo la dato 1987. Tute sube: 1987.7.26. La stampo posedas nur ĉinajn ideogramojn. Urbo: Yizheng, provinco Jiangsu.

ĈIN 64 Filatela Ligo

Ronda stampo. Inter laŭrobranĉoj la emblemo de la ĉinaj filatelistoj kaj sub ĝi nia Esperanta stelo. En la suba rondo „LA 5 JAROJ DE CHANGSHU-A FILATELO-LIGO". Supre ideogramoj. Dato: 1988.8.29. Urbo: Changshu. Aperigis ĝin la PT-oficejo en Changshu. Desegnis Zhang Linrui, ankaŭ la memorkoverton. La stampo ekzistas en versio: sube en hanlingva fonetiko. Stelo sen E. Sur la memorkoverto estas bildo pri la „Pavilono de Lernado", kiu, laŭ legendo, estis loko de la antikva reĝido Ŝjaŭ. La templo situas sur la Ju-monto de Changshu kaj nun estas malferma kiel parko por la civitanoj.
Okaze de tiu jubileo la Filatela Ligo de Changshu gajnis arĝentan medalon por sia E-filatela ekspozaĵo. Koran gratulon! Dankon al Li Changlu, Kajĝi kaj Linrui pro la senditaj informoj!

ĈIN 34 A 100 jaroj E

Jam komence de 1988 kelkaj kovertoj kun ĉi stampo atingis nian stampobankon. Ne estas konate al mi, kiu sendis ilin. Tio estus eble grave por ekscii pri ĝia oficialeco. La poŝtejo en la urbo Nantong ankoraŭ ne respondis skriban demandon de nia Kajĝi pri la oficialeco. Temas pri ovala stampo kun meza: ESPERANTO,

en kiu la S estas inverse skribita. Sub la ovalo en nigra balko la dato 1987.7.26 kaj ideogramoj. Ricevita de Heimlich.

ĈIN 35 A 100 jaroj E
Chen Minglun, raportisto de Ningpo-ĵurnalo informis nian Kajĝi, ke tiun ĉi stampon (kaj ankaŭ 49) desegnis Chen Minggang. La stampo estas ronda kaj montras malfermitan fenestron kun la vorto ESPERANTO en ĝi. Sub tio: 1887-1987 kaj la dato 1987.7.26. Urbo: Ninghai. Dankon al la informinto, kies nomon mi perdis, kaj al Kajĝi.

ĈIN 65-1 Monda Poŝta Tago
La P.T.-Administracio de la provinco Jiangsu aperigis vertikale-ovalan stampon okaze de „LA 19-A MONDA POŜTTAGO" kun la dato 1988.10.9 en ĝi. En la supra ovalo ĉinaj ideogramoj, sube maldekstre la teksto en hanlingva fonetiko kaj sube dekstre la teksto en E. En la mezo pozas poŝta korno kaj super ĝi estas kvinpinta stelo (sen E). La stampon desegnis nia Zhang Linrui.
Lige kun la stampo la P.T.-Administracio eldonis bele aspektan memorkoverton. La provinca estro Gu Xiulian faris per ideogramoj dediĉan surskribon „Celebro al la 19-a Monda Poŝta Tago - Gu Xiulian". Tiu dediĉo estas ore surpresita. Maldekstre troviĝas desegnaĵo kun terglobo ĉirkaŭata de kvin flugantaj homoj kun kovertoj. La ideogramoj en ĝi signifas: „Poŝto ĉiam ekzistas kaj universaliĝas" kaj „memorkoverto". Apud ĝi troviĝas surpresita en ruĝa nia 65-1. Por la nuligo de la pm la poŝto uzis la nigran koloron (ankaŭ 65-1).
Ni dankas pro la informoj al niaj amikoj Kajĝi kaj Linrui.

ĈIN 65-2 Monda Poŝta Tago
La tute samaspekta stampo de la Maanshan-a Poŝtmarka Kompanio en la provinco Anhui diferenciĝas de 65-1 per stelo kun E super la poŝta korno. Tiu ĉi stampo estas originale viole stampita kaj ĝia mezuro estas 27 x 40. Dekstre sekvas la Esperantan tekston ideogramoj por la urba nomo. La unua ideogramo similas al „1E". Dankon al nia Kajĝi kaj al Jiang Daming.

ĈIN 66 Romano Tri Regnoj
La 25an de novembro 1988 en Ĉinio aperis serio kun 4 poŝt-

markoj por la ĉina klasika romano Tri Regnoj. En Nanchang, provinco Jiangxi, estis tiudate uzata unuataga stampo kun teskto en E: La Historia Romano de la Tri Regnoj. En la mezo de la stampo estas tri rondaj sigeloj. Desegnis: Mao Hongzhen.
En Nanchang aperis ankaŭ poŝta unuataga koverto por tiu ĉi serio, sed ne Esperanta: Dorsflanke ĉine estas notitaj klarigoj pri la 4 poŝtmarkoj:
8 fenoj: Fratiĝa allanco de tri personoj en persika ĝardeno
8 fenoj: Tri herooj batalas kontraŭ Liu Bu
30 fenoj: En Feng-yi-ting Pavilono
50 fenoj: Diskuto pri herooj dum trinkado de vino.
Dankon al Ĉin Kajĝi pro la informoj!

ĈIN 67 Junulara E A
La 13an de decembro 1987 okazis la fondiĝo de Junulara E A de Nanchang. Okaze de ĝia 1-a naskiĝtaga jubileo aperis memorige poŝta stampo kaj memorkoverto. Iniciatis: Junulara E A Nanchang. Eldonis: poŝtoficejo Nanchang. Dato: 1988.12.13. Desegnis: Mao Hongzhen [pr. Maŭ Hongĝen]. La stampo posedas en la mezo Esperantan stelon kun kvin kolomboj. Supre estas ĉinaj ideogramoj kaj sube la teksto: „La 1 jaro de Nancahng-a Junulara Esperanta Asocio". La memorkoverto supre montras ideogramojn. Maldekstre estas Zamenhofa portreto inter bluaj kontinentoj kun ruĝaj steloj kaj verdaj branĉoj. Dankon al nia Kajĝi kaj Cao Xinglin.

ĈIN 60 A Ĝomolangma ekspedicio
En *El Popola Ĉinio* 9/1988 ni povas legi raporton de Gang Sjaŭ˘ ping pri la transgrimpado de la tergloba kulmina punkto fare de ĉina-japana-nepala ekspedicio. Memore al tio aperis en Lhasa, Aŭtonoma Regiono Tibeto poŝta stampo kun la dato 1988.5.5. Tagmeze de tiu tago la ĉina sportulo Cering Doĉe unua atingis la pinton. En la suba rondo de la stampo ni povas legi la Esperantan tekston: „ĈINIO-JAPANIO-NEPALO AMIKECA EKSPEDICIO AL QOMOLANGMA/SAGARMATHA 1988". Meze troviĝas la triangula emblemo de la ekspedicio. Teksto en la tibeta estas sub la triangulo. Loko: Lasa. Supre ideogramoj. Tiu stampo estas trilingva: hanlingva, tibeta kaj Esperanta. Dankon pro la informoj al Ĉin Kajĝi.

ĈIN 68 Budala Palaco
La Poŝtmarka Kompanio de Tibeta Aŭtonoma Regiono aperigis

apud 60 A ankaŭ tiun ĉi stampon, kiu unuafoje estis uzata en la 15a de decembro 1988 kaj nun estas uzata dum pli longa tempo en Lhasa. La ronda stampo posedas meze la faman palacon sur la „tegmento de la mondo". Sub ĝi la teksto: BUDALA PALACO kaj: 850000. En la suba rondo: PEJZAĜA POŜTSTAMPO DE LASA. Estus interese scii, ĉu la ideogramoj en la supra rondo estas ĉiuj ĉinaj kaj kion ili signifas. La stampojn 60 A kaj 68 desegnis Zhang Linrui. Kore ni devas danki al nia Ĉin Kajĝi pro la senditaj informoj kaj kopioj. Pere de mia E-Ĉina vortaro, mi trovis, ke la du maldekstraj ideogramoj signifas Lhasa.

Stampoj „Serpenta Jaro"

La Ministerio de Poŝto kaj Telekomunikado en la P.R.Ĉinio emisiis specialan poŝtmarkon por la „Serpenta Jaro" la 5-an de januaro 1989 kuin valoro de 5 fenoj. Laŭ ĉina tradicio la nuna jaro estas Jishi (Serpenta) Nian (Jaro). Serpento estas la 6-a Shengxiao (simbolo) (ekzistas 12 simboloj en la luna kalendaro). Iam pri tio mi legis en EPĈ. Pasintjare estis la Draka Jaro. En la nuna momento atingis min informoj pri tri unuatagaj stampoj. Sed mi supozas, ke ekzistas pluraj aliaj. Tial nur fine de la jaro mi donos numerojn al ili por ne havi tro da konfuzo en nia numera ordo.

Serpenta Jaro - Changshu

Aperigis ĝin la PTOficejo en Changshu laŭ desegno de Canŝio. Supre tri ideogramoj por „Serpenta Jaro". Meze situas en cirklo serpento kaj sub ĝi la dato: 1989.1.5. Sube en hanlingva foneti-ko: JISI NIAN kaj SERPENTA JARO.
La Esperanta unuataga koverto montras serpenton kun du homaj kapoj. Temas pri Yanwei, unu el la antikvaj dioj de la ĉina mito-logio „Pri montoj kaj maroj". En Ĉinio Yanwei simbolas feliĉon, harmonion kaj amon. Desegnis: Linrui.

Serpenta Jaro - Hangzhu

Je dispono nur stampkopio. Ronda stampo kun serpento en la mezo. Sub ĝi la dato 1989.1.5 kaj ideogramoj. Sube: SERPENTA JARO. Desegnis ĝin: Zhu Dailin.

Serpenta Jaro - Ma'anshan

La stampon kaj Esperantan UTK aperigis la Ma'anshan-a Poŝt-marka Kompanio. Desegnis: Zhang Linrui. La violkolora stampo supre posedas tri ideogramojn por „Serpenta Jaro". En la mezo

troviĝas dika stilizita serpenta kapo. Sub ĝi la dato 1989.1.5. En la suba rondo: JISI NIAN - SERPENTA JARO. La UTK montras sur verda fono langumantan oran serpenton.

Serpenta Jaro - Nanchang
Mao Hongzhen estas la desegnisto de tiu ĉi stampo aperinta en Nanchang. La stampo estas spiralforma kaj finiĝas per serpenta kapo kun forka lango. Sub la kapo la teksto: La Serpenta Jaro kaj du ideogramoj. Ekzistas samaspekta stampo nur en la ĉina. Ekzistas tre bela ne-Esperanta UTK. Dorsflanke ideograma teksto. Krome aperis en Ĉinio pk-tutaĵo kun nominalo de 4 fenoj.

Serpenta Jaro - Weihui
En la provinco Henan, urbo Weihui, aperis pk kun ruĝa serpentjara stampo. En ties mezo Esperanta stelo kun serpento. Supre tri ideogramoj kaj maldekstre la teksto SERPENTA JARO. Dekstre la dato: 1989.1.5.

Nove trovitaj ĉinaj jubileaj
Post redaktofino de la nuna informilo alvenis de nia Ĉin Kajĝi sciigoj pri la nur nun trovitaj (aŭ aperintaj?) jubileaj stampoj kun la dato: 1987.7.26: Daĉing: kun E-stelo kaj la tre stranga datarango: 1887-1987 LA 26AN DE JULIO, Amŝan: kun grandaj literoj SJY en la mezo, kaj Ĝjinĝou: en la mezo terglobo kun grandega E sur ĝi. Ilin vi trovos en nia nova stampokatalogo. Mi nun volis skribi: sub la numeroj ... sed mi preferas nunmomente ne doni numerojn, ĉar post trovo de alia nekonata denove la tuta numera ordo disfalus.

Serpentaj stampoj
Bone ke mi ne komencis doni numerojn al ili. Unue pro tio, ĉar nova stampokatalogo numerigos ilin. Dua okazas, ke ankoraŭ meze de marto atingas min nekonataj kun por mi nelegeblaj urbonomoj. La sendintoj tute ne klarigis tion. Mi trovis ĝis nun la jenajn, sed posedas kelkajn nur kopie: Changshu, Hangzhu, Hohhoto, Ma'anshan, Nanchang, Weihu (Henan-prov.) kaj du por mi nelegeblajn krom la vortoj SERPENTA JARO. Necesas do konsulti nian Ĉin Kajĝi.

JU 39

Atingis min fotokopio pri memoriga karto kun poŝta Esperanta stampo pri la 80-jara jubileo de Esperanto-Societo Zagreb. La stampo estas ronda kaj en la mezo posedas desegnaĵon pri konstruaĵo kun tri turoj sur kvinpinta stelo. Sube troviĝas la dato: 28.12.1988 kaj la loko: 41001 Zagreb. La teksto: 80. OBLJETNICA DRUSTVA ESPERANTISTA U ZAGREBU. Gratulon al niaj gesamideanoj en Zagreb!

HU 109

Nia kluba amiko Fekete informis pri tiu ĉi stampo okaze de la 18-a Vintra Esperantista Ferio. La ronda stampo denove prezentas neĝviron kun surventra Esperanta stelo. La stampo estas bone grafikita kaj pure aplikita. Mi posedas la stampon kun datoj de la 28-a kaj 29-a de decembro 1988. El VEF 1988 salutis ankaŭ nia Mario Amadei kaj Alessandro Bellini. Amadei skribis, ke partoprenis 220 partoprenantoj el 12 landoj. Dankon al Fekete, al Amadei kies voĉon antaŭ nelonge mi aŭdis en Radio Polonia, kaj al Bellini.

PO 132

La 15-an ĝis la 18-an de decembro 1988 okazis la „I-aj Bjalistokaj Esperanto-Tagoj" Partoprenis i.a. Milojević, Umeda, Blanke kaj la fama Malinovski. La poŝtejo Białystok 1 uzis stampilon kun la teksto: CENTRUM ZAMENHOFA. En la mezo de la stampo estas iom ŝanĝita nia jubilea simbolo kaj sube la dato: 1988.12.15. Koran dankon al niaj klubaj geamikoj Mikulski, Bielak kaj al Roman Kubczyk, Box 449, PL 42-217 Czestochowa en Pollando.

GDR 37

Nia kluba amiko Rolf Beau en Leipzig informis min pri tiu ĉi nova stampo en GDR. Uzata ĝi estis dum la tuta monato novembro 1988 okaze de la „Tago de la Esperanto-Libro". La stampo montras portreton pri Antoni Grabowski. Certe vi scias, ke PEA pasintjare festis Grabowski-Jaron. Grabowski laŭdire faris kun Zamenhof la unuan Esperantlingvan konversacion. Li estis unu el la plej elstaraj esperantistoj. Legu pri li en *EdE*, p.199.

JU 38 (eble) - 44-a TEJO-kongreso

„Eble" tial, ĉar informado pri E-filatelaĵoj el Jugoslavio egalas al nulo. Hazarde trovis la vojon al mi meze de februaro 1989

stampo kun diametro de 32 mm, dato: 15.07.1988 el 41001 ZAGREB. La stampo montras grandan kvinpintan stelon kun enmeza urba blazono kaj la literoj TEJO (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo). La stampo tekstas (eble en la serba kaj kroata...)

44. MEDUNARODNI OMLADINSKI KONGRES
SVETSKOG ESPERANTSKOG OMLADINKOG SAVEZA

Eble tio signifas: 44-a INTERNACIA ESPERANTISTA JUNULARA KONGRESO. Ĝi okazis en Zagreb de 15-22.07.1988.

...Se la informado flanke de iuj niaj membroj pri ilialandaj novaj E-filatelaĵoj estas nula, pri kio mi skribu en nia informilo? Volonte mi detaligus tiun ĉi problemon, sed plurfojaj apeloj per antaŭaj numeroj portis neniun frukton. Ni estas tre malgranda klubo kaj ni nomiĝas „Amika Rondo". Tio inkludas ke ĉiuj membroj aktive kunlaboru, almenaŭ per informado. Nia klubo ne celas rekordciferajn abonojn sed atendas kunlaboron de ĉiu membro, kaj tion ja praktikas la granda plimulto el ni.

HI 29 IPA-blazono

Nia kluba amiko Emilio Folgado Lopez afable sendis tiun ĉi hispanan stampon kun blazono de IPA, kiu, malbone legeble, posedas la Esperantan surskribon SERVO PER AMIKECO. La hispana teksto en ĝi: I SEMANA DE LA AMISTAD (IPA). Dato: 5 OCT 1988. Urbo: BARCELONA - ESPAÑA. Akompanas ĝin ornama koverto, eldonita de la hispana IPA-sekcio kun tre bele farita surpreso de la IPA-emblemo. Tie bone legeblas la Esperanta surskribo. Dorsflanke de la koverto troviĝas en la hispana klarigoj pri IPA, kiujn mi bedaŭrinde ne povas traduki por vi, kvankam estus utile koni la tekston.

AF 37

La afrankstampon el Bad Hersfeld pri la 100-jara E-grupo en Nürnberg nun sekvis nova, kiu posedas en la tekstoparto germanlingve la propagandan teskton: ESPERANTO / DIE INTERNATIONALE SPRACHE / verbindet die Völker (E - la internacia lingvo - interligas la popolojn). Ankaŭ tiu ĉi AF estas uzata de la sekretariejo de Germana Esperanto-Asocio en Bad Hersfeld, kie nia kluba amiko Richard Hirsch funkcias kiel ĝenerala sekretario de GEA. Verŝajne tiu AF funkciis ekde 9.1.89. Dankon al Hirsch pro la alsendo.

BU 20 ILEF-festivalo

Estis sufiĉe komplike akiri ĝin. En iu gazeto mi legis nebulan

informon pri ĝi, sciigis pri tio nian Hlebarov. Kaj li post longa tempo sukcesis akiri ĝin. Estas stranga afero, ke en Bulgario niaj E-filatelistoj kutime multe tro malfrue ekscias pri novaj bulgaraj E-filatelaĵoj. Kvankam ekzistas sekcio por kolektantoj en BEA. Ankaŭ la Vraca-stampo de 1986 silente funkciis kaj sin kaŝis antaŭ la publiko. La nuna stampo estas ronda kaj posedas meze la ILEF-emblemon kun Esperanta stelo. Supre la teskto: DUA INTERNACIA KINO FOTO FESTIVALO. Loko: 3000 VRACA 10. Dato: 10-15.X.1988. Dankon al nia Hlebarov, kiu sendis la informojn.
Aperis tutaĵo: koverto kun 5-stotinka poŝtmarko, kiu ricevis Esperantan surpresaĵon kun la ILEF-emblemo.

Novaj glumarkoj

74-a UK en Brighton, Anglujo, 29 jul - 5 aŭg 1989. En folio estas 4x4 glm. Memgluaj. Ekzistas en nigra sur blanka kaj nigra sur flava. Dankon al R.Hirsch pro la informoj.

62-a SAT-kgr. en Illertissen, Bavario (FRG), 5-12.8.1989. En folio estas 3x4 glm. Memgluaj. En la blazono tri P-oj. Dankon al Richard Hirsch kaj Werner Bormann pro la informoj.

73-a Brita E-kgr. 1989, Stoke on Trent, ronda glm. (Hammerton).

67-a Germana E-kgr. Pentekosto 89, lume verda (Hirsch).

Tiu ĉi numero de *La verda lupeo* estis tajpita, kopiita kaj ekspedita de Flandra Esperanto-Ligo, Grafika Centro Antverpeno, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.

Ni funebras!

Mortis nia Dolfa Bartoŝik

La 3-an de februaro 1989 forpasis en la aĝo de 82 jaroj nia kara kluba amiko

Adolf Bartoŝik

Kvankam ni sciis, ke en la lasta tempo li estis malforta kaj malsana, lia subita foriro ŝokis nin ĉiujn, kiuj havis tiun feliĉon povi aparteni al liaj personaj amikoj. Dolfa estis profunde konvinkita pri la utileco de Esperanto kaj tial li dediĉis multajn fortojn al ĝia disvastigo. Niaj membroj konis lin antaŭ ĉio kiel filateliston. Li estis elstara filatelisto: organizanto, publicisto, kolektanto, ekspoziciantо. Li estis unu el la tri fondintoj de AREK, kiuj en la poŝtmark-ekspozicio PRAGA 1986 en Praha decidis fondi nian klubon. Li ankaŭ estis kunfondinto de la sekcio Esperanto en la Asocio de Ĉeĥoslovakiaj Filatelistoj. Sian kolekton „Historio kaj nuntempo de Esperanto" li elmontris jam en la PRAGA 1962. Lia ekspoziciaĵo apartenis al la du-tri plej bonaj de tiu ĉi temo en la tuta mondo. Tion plej bone pruvas akiritaj medaloj: 1 ora, 11 orumitaj, 16 arĝentaj kaj tuta vico da aliaj premioj. Ne eblas povi ĉiutage renkonti homon tiel modestan, sinceran, oferеman kaj amikan, kia estis nia Dolfa. Ni ne forgesos lin.
Ripozu en paco, kara nia Dolfa.

Novaj membroj

Xiong Yingqiao, Yingwa gongshang yinhang, Hanyang, Wuhan, Hubei, Ĉinio.
Lu Chengzi, str. Jing 3, n-ro 3/3, korto 8, Zhengzhou, Henan, Ĉinio.
Sheng Shuchu, Xia Tang jio 302, Chang men nei, TJ-215003 Suzhuo.
Jia Jung-Cheng, Cao Yang 7, cun 61, Hao 104 Shi, Shanghai, Ĉinio.
Michael Peters, Coubierestr. 6, D-1000 Berlin 30.
Utho Maier, Dewanger Str. 19, D-7080 Aalen.
Anton Kronshage, Eulenweg 27, D-5830 Schwelm.
Vlasimil Kočvara, Ant. Sovy 10, CS-74705 Opava.
Johan Szilagy, Karek u.24, III/17, H-1035 Budapest.
Bartolomeo Czako, Bajza 14, H-3528 Miskolc.
Belucci Alessandro, Via delle Formiche 7, I-58043 Castiglione della Pescaia.

Pierre Assalit, 30 avenue des Champs Perdrix, F-21000 Dijon.
N. Sakurat, T.I.P.O. Box 5197, J-100-31 Tokyo.
Ziro Suzuoki, 14-1 Okamoto 7, Higasinada, J-658 Kobe.
Mark Swarthout, 416 Dalebrook Lane, Birmingham MI, USA-48010.

Bonvenon en ELF-AREK! Bonvolu regule informi la redaktoron de „La Verda Lupeo" pri novaĵoj en via lando.

Nia stampobanko (kaj poŝtmarkobanko)

La mastro de nia banko pretigis la ofertoliston 1/89, kiun ricevas tiuj, kiuj petas ĝin de li. En nia banko troviĝas pli ol 4000 stampoj, preskaŭ ĉiuj E-poŝtmarkoj kaj multaj tutaĵoj, UTK, glm k.t.p. Novajn materialojn akceptas la banko nur post antaŭa interkonsento. La adreso: Werner Heimlich, Fröbelstraße 4, D-3040 Soltau. Ne forgesu aldoni por la respondo respondkuponon, kaj laŭeble slipon kun via adreso.

Nia kotizo altiĝis!

Por 1989 la kotizo estas dek usonaj dolaroj aŭ sesdek svedaj kronoj. La kotizon akceptas kiel ĉiam s-ro I. Paulsson.

Anoncoj

Esperantajn filatelaĵojn deziras interŝanĝi:

☑ James Rezende Piton, Av. Joao B. Morato do Canto 257/J2 CEP. 13.030, Campinas-SP, Brazilo (nur E-pm!).

☑ Zhu Baogang, Xi'an Gongdianju, TJ-710032 Xian, Shaanxi, Ĉinio.

☑ Xiong Yingqiao, Yingwu gongshang yinhang, Wuhan, Hubei, Ĉinio.

☑ Cao Xinglin, Ruzitu 25 hao, Nanchang, Jiangxi, Ĉinio.

☑ Zhou Zhi Qi, Lian Sheng jie 2, Changsha, Hunan, Ĉinio.

Nova adreso:

☑ Michael Karpati, Gluski str. 36, Rishin le Zion, IL-75261.

☑ Jean Amouroux: nova poŝta kodo: F-66100.

☑ Hervé Gonin, 29bis rue de la République, F-59552 Lembres-lez-Douai.

Hungara bildparto

La Radnai-katalogon pri hungaraj filatelaĵoj komisie vendas kontraŭ F 6.-: Dick Goslinga, Biesbosstraat 24, NL-8226 EB Lelystad.

Nova stampokatalogo preta!

Surbaze de nia stampokatalogo 1983 kun la suplementoj I-V nia kluba amiko Richard Hirsch manuskripte pretigis novan stampokatalogon. Niaj geamikoj Strönne kaj Heimlich dum multaj horoj faris korektojn en la manuskripto kaj en Leipzig mi kaj Hirsch faris lastajn polurojn pri ĝi. Nun temas pri la eldonkvanto. Ni devas antaŭe scii, kiom da ekzempleroj estas bezonataj, ĉar la multobligo kostas sufiĉe multe da mono, kiun Hirsch pagos el sia propra poŝo.
Nepre skribu al Hirsch, kiom da ekzempleroj vi bezonas. La prezo denove estos 15 irk aŭ egalvaloro en konvertebla valuto.
Nepre vi bezonas tiun novan katalogon, ĉar la katalogaj numeroj ĉe pluraj landoj ŝanĝiĝis. Se restus profito el la vendado, ĝi plene iros en la kason de ELF-AREK por subvencii nian *La verda lupeo*, kiu daŭre aperadas deficite.
Ni decidis, aperigi la novan katalogon kun 50 ekzempleroj, do la mendantoj ĝin tutcerte ricevos. Verŝajne ankoraŭ ĉi-jare aperos kompleta bildparto por ĝi surbaze de tiu bildparto de 1971, kiu montras ĉiujn bildojn. La bildparton ankaŭ akompanos kompleta prezolisto por stampoj. Ankaŭ tion vi devus provizore kaj nedevige mendi ĉe Richard Hirsch, Lambertstr. 12, D-6430 Bad Hersfeld.

ELF-AREK-anoj rendevuis en Leipzig
Pri tiu kunveno mi sciigis en nia *LVL* 76. Venis nur 3 niaj membroj: Beau, Hirsch kaj mi. Kvankam je dispono estis granda salono por ni en klubejo ni kunsidis dum multaj horoj kaj priparolis la enhavon de nia nova stampokatalogo en la loĝejo de Beau. La vesperojn ni pasigis kun la membroj de la E-klubo Leipzig.

Niaj poŝtmarkoj

Volapükaj poŝtmarkoj trovitaj
Nia kluba amiko Richard Hirsch en 1988 dum filatela ekspozicio en FRG ricevis de alia filatelisto la informon, ke iam antaŭ 1900 en Ĉinio aperis poŝtmarkoj kun Volapüka teksto. Nia Hirsch ekaktivis por serĉi konkretajn informojn kaj tiajn trovis!
En la filatela biblioteko de München (Munkeno) li ricevis katalogojn pri ĉinaj poŝtmarkoj. Sub la rubriko „ĉinaj lokaj markoj" li trovis ilin. La 15-an de novembro 1894 aperis serio da provizoraj poŝtmarkoj por ĉinaj havenurboj. Du el ili aperis por la havenurbo AMOY kaj tiu nomo aperas sur la provizoraĵo. Tre malklare estas surpresita: MON BEVÜNETIK (mono internacia) kaj: Frana Cims (francaj centimoj). Ekzistas du valoroj: 1 kaj 25 Frana Cims. En la urbo Amoy ekzistis aktiva Volapüka grupo. La katalogo mencias, ke la du provizoraj poŝtmarkoj troviĝas sur poŝtkarto sendita la 6an de majo 1895.
Tiu trovo de Hirsch denove pruvas, ke ni Esperanto-filatelistoj nepre kunlaboru aktive en la ĝenerala filatela movado, ĉar ĝi estas utila por la Esperanto-filatelio. Vizitu altrangajn filatelajn ekspoziciojn ĉar tie vi propraokule vidas kiel praktiki por fari bonajn filatelajn ekspoziciaĵojn. Nelaste rezultiĝas utilaj kontaktoj kaj novaj fontoj pri Esperanto-filatelaĵoj.
Ni gratulas al nia Richard Hirsch kaj dankas al li pro la valoraj informoj.

Denove pri Surinamo
Dum la Ahrenshoop-a seminario 1989 de GDREA Simo Milojević rakontis al mi, ke iutage en 1986 aperis ĉe UEA kunlaborantoj de la Surinama poŝta servo. Ili petis materialojn pri Esperanto por prepari Esperanto-poŝtmarkojn. Ili ricevis kaj poste revenis kun vico da desegnaĵoj. El tiuj Milojević kaj aliaj elektis la tri konatajn poŝtmarkojn. Laŭ mi tiuj sciigoj estas sciindaj bagatelaĵoj pri kiuj preskaŭ neniam oni aŭdas.

UK en Kubo kun E-pm
Milojević estis fine de 1988 en Kubo kaj eksciis tie pri preparo de kongresa poŝtmarko. Tio estas ĝojiga informo por ni.

Redaktora fuŝinformo pri CS-bloko
Niaj klubanoj Patera kaj Vana kritikis fuŝinformadon pri la nova CS-folio kun Esperanta talono. Patera skribis, ke „eltonditaj el

tutaĵoj kaj presfolioj ne validas por afranko" laŭ la reguloj de la ĉeĥoslovakia poŝto. Necesas doni nur unu numeron al la tuta folio. Se estas tiel, kompreneble mi konsentas. Antaŭe mi ne sciis pri tio. Nova ordigo de E-pm-katalogo tion konsideros. Cetere tiu listo en la stampokatalogo de 1983 estis nur provizora kaj celis nur plifaciligi kompiladon de mankolistoj. Kompreneble ankaŭ la tutaĵoj ne apartenas al laŭvica numerigo de poŝtmarkoj aŭ iuj variaĵoj. Momente nia Hirsch kompilas novan pm-liston. Pri tio pli poste.

Polaj dentumoj
Patera skribis, ke „koncerne la 45-zlotan, Rutkowski pravas pri la dentumo je la supra marĝeno. Tamen miaopinie necesas ankoraŭ klarigi, ke la samo pri la vertikala dentumo koncernas ankaŭ la malsupran marĝenon de la folio." Mi ne certas, ĉu vi, kara Patera, posedas malsupre nedentumitan marĝenon? Eble eĉ ekzistas kaj supre kaj malsupre dentumitaj marĝenoj? Tion povus respondi ankaŭ ĉiuj aliaj niaj klubaj geamikoj. Verdire en Varsovio mi tute ne atentis pri tio, eĉ ne havis la monon por aĉeti foliojn.

Bulgaraj dentumoj
Patera atentigis ankaŭ pri dentumitaj kaj nedentumitaj marĝenoj de la bulgara poŝtmarko n-ro 61. Li posedas tiun poŝtmarkon kun kaj sen dentumo de malsupra marĝeno de la folio. Prave Patera skribas, ke tiaj ŝajne bagatelaj diversaĵoj estas por filatelaj specialistoj tre gravaj kaj foje eĉ valore diferencaj. Do, ek al la laboro kaj trovu tiajn ĝis nun neatenditajn diversaĵojn kaj skribu pri tio al mi, por ke ni ĉiuj eksciu pri ili.

Brazila variaĵo en ĉina poŝtmarka katalogo
Gert Drucker skribis pri la ĉina E-pm-katalogo, ke ĝi estas elstare kompilita kaj de bonega kvalito. Kaj li atentigas pri la brazila pm sur p.31, ke ĝi montras la variaĵon kun makulo en la vizaĝo, kiu aperas same sur la dentumita pm (en la dekstra parto de la vizaĝo).

Famaj personoj – esperantistoj

Ludwig Renn (1889-1979)

La germana verkisto loĝis ĝis 1928 en Zwickau [Cvikaŭ] kaj tie en laborista naturamika klubo ekhavis amikecajn kontaktojn al la laboristaj esperantistoj Ewald kaj Rudi Nier kaj Hans Uhlig. Ofte ili kune ripozis apud proksima lageto. Rezultiĝis la esperantistiĝo de Renn. La intima amikeco inter ili daŭris tra la tuta vivo de ambaŭ. En 1928 Renn translokiĝis al Berlin kaj tie havis firmajn kontaktojn al Germana Laborista Esperantista Asocio. Ofte li faris propagandajn prelegojn por GLEA. En 1931 li fariĝis prezidanto de Internacia Asocio de Revoluciaj-Esperanto-verkistoj. Konatiĝis el lia plumo du originale verkitaj poemoj en Esperanto: „Senlaborula kanto" kaj „Kontraŭmilita kanto". De 1933 ĝis 1936 Renn restadis en nazia karcero. Poste li trans Svislando iris al Hispanio kaj partoprenis sur la respublikana flanko la batalon kontraŭ Franco. Li estis komandanto de la Thälman-Bataliono kaj stabestro de la XI-a Internacia Brigado. Li fariĝis proksima amiko de generalo Mangada-Rosenörn, kiu estis prezidanto de la Hispana Esperanto-Asocio. Ankaŭ Mangada estis siatempe fama Esperanto-verkisto.

En la 28a de februaro 1989 aperis en GDR poŝtmarko memore al Renn kun lia portreto. Ekzistas poŝta E-stampo (GDR 13) kun la portreto de Renn kaj E-poŝtkarto de GDR (1981) kun faksimilo de la Renn-saluto el Valencia (Hispanio) de 4.7.1937.

Fontoj:
PACO, GDR-eldonoj 1980 kaj 1981
EdE, p.464
La mondo, 6/1933, Ŝanhajo
Popola Fronto, 18/1937, Hispanio
Internaciisto, 13/1931, p.104
sammler-express, 3/89 p.79, GDR



Alfred Hermann Fried (1864–1921)
La aŭstra publicisto Fried estis talenta kaj fervora pacifisto kaj ricevis en la jaro 1911 la Nobel-pac-premion. Li loĝis ankaŭ en Berlin kaj fondis tie en la jaro 1892 la Germanan Pacosocieton laŭ iniciato de Bertha von Suttner. En 1903 li verkis Esperantan lernolibron por germanoj kies 3-a eldono aperis en 1905. En tiu jaro li apartenis al la unuaj membroj en la Internacia Societo Esperantista Por La Paco „Pacifisto", fondita de la franco Gaston Moch. Fried, Moch kaj Schneeberger estas nomoj nedisigeblaj de la frutempa Esperantista pacifista movado. Famiĝis la telegramo de Fried el la dua packonferenco en Hago en 1907 al la Universala Kongreso de Esperanto en Cambridge kun la teksto: „*El la falsa Pac-konferenco mi salutas la veran Pac-konferencon*". Por la Haga konferenco ekzistas nederlandlingva memoriga poŝta stampo. Tio ĉi estas por ni filatela juvelo por dokumenti la pioniran Esperantan pacifistan movadon. La aŭstra poŝto anoncis por 1989 aperon de memoriga poŝtmarko kun la portreto de Fried okaze de lia 125a naskiĝdatreveno (foto sur p.1).

Fontoj:
Espero Pacifista, 1907, aŭgusto-oktobro, p.206
PACO, GDR-eldono 1987
EdE, p.26, 161, 430
Letero de Amouroux al Burmeister, 10.1.1989

Ni en ekspozicioj

IAKSTE-ekspozicio
La unuan premion kun la nomo „Verda Stelo" ricevis nia kluba amiko Chen San (KORALO) pro sia E-filatela ekspozicio en IAKSTE 1988. Pri la ekspozicio nia luksa movada magazino *El popola Ĉinio* 12/88 aperigis dupaĝan kolore ilustritan artikolon. Gratulon! Dankon ankaŭ al nia kluba amiko Ĉin Kajĝi, kiu zorgis pri la okazigo de tiu ekspozicio. La redakcio de *EPĈ* dediĉis en la jaro 1988 grandan atenton al la Esperanta filatelio.

Ekspozicio en la ĉina Ujgura Aŭtonoma Regiono
Nia kluba amiko Cui Haijing partoprenis kun sia filatela ekspoziciaĵo sub la titolo „Esperanta posto kaj filatelio" filatelan ekspozicion en la urbo Urumĉi. Li ricevis unuagradan premion. Koran

gratulon! La ekspoziciaĵo de Cui Haijing ampleksas 48 foliojn. Dankon al li pro la alsendo de la ekspozicia katalogo!

Ekspozicio en Changchun

En oktobro 1988 okazis en la Popola Kultura Palaco de Changchun filatela ekspozicio. Li Changlu montris tie Esperanto-filatelan ekspoziciaĵon kaj ricevis duagradan premion. Gratulon al li kaj dankon pro la informo!

Fekete-ekspozicioj

Nia kluba amiko Fekete dum 1988 estis tre aktiva en pluraj ekspozicioj. En majo li partoprenis en la pola Katowice ekspozicion. Pro malbona organizado, funkciis nek ĵurio nek haveblis katalogo, medaloj aŭ premioj ne estis atribuataj. Krome perdiĝis unu folio el la ekspozicio...

En septembro 1988 li montris sian ekspoziciaĵon „Esperanto en la fervoja trafiko" en landa fervojmotiva ekspozicio kaj ricevis medalon en rango de arĝenta bronco. Gratulon! Dankon pro informado!


中国人民邮政 8


己巳年
1989.1.5
JaSerpentaJaro
南昌


'S GRAVENHAGE
GROOTE GRAFELIJKE
10.10.07.
ZAAL.
VREDESCONFERENTIE


己巳年
中国
马鞍山
1989.1.5
SERPENTA


AMOY


己巳年
江苏
常熟
1989 1.5